Harald Schäfer,

Somero de Sankta Marteno

tradukita de Manfredo Ratislavo

Folioj suben falas ĉie
kaj ĉiu falo estas vivo-fin' –
ni fuĝas nun al lokoj, kie
la timo ne minacas nin.

Plej grandas eble ĉi sezono
Pentranta morton en kolor-ebri' –
konsole sonas en la fono
la kanto jam de la resurekci'.[2]

Traduko de la Germana poemo "Altweibersommer" de HARALD SCHÄFER *(∗1931-01-15 – †2001-09-09) en Esperanton de* MANFREDO RATISLAVO *(Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, ∗1938-11-04).*

Arg-285-580 (2005-03-07 14:59:54)

La verkoj de Harald Schäfer estas aperintaj en la eldonejo R. G. Fischer (Orber Str. 30, D-60386 Frankfurto ĉe Majno).
Eltiraĵo el la libro-karto de la eldonejo R. G. Fischer pri la aŭtoro Harald Schäfer: "Harald Schäfer siatempe ne nur surscenigis la legendecan germanan televido-serion "Hesselbach" kun entute 52 daŭrigaĵoj - li estis krome dum pluraj jaroj la reĝisoro de la sukcesplena Heslanda Teatro-Komunumo en la urbo Darmstadt, kun kiu li surscenigis multajn dramojn en Heslanda dialekto ĉe la Ŝtata Teatro. Multnombraj libroj en la Germana lingvo kaj en la heslanda dialekto, por heslande kaj por altgermane parolantaj homoj, devenas el lia plumo. Sed krom tiuj eldonaĵoj ekzistas ankaŭ multaj publikigaĵoj pri aliaj temoj verkitaj de la sama aŭtoro."

[2] aŭ: la kant' de l' revivig' por ni.